




Kapti tri ŝtonojn kalkuliĝas 'iom malpli ol 4 poentoj'.



Diag. 28 En ĉi tiu formo (translokita al Supra Maldekstra angulo),...




Diag. 29 la valoro de N1 forkaptanta tri ŝtonojn kalkuliĝas,...




Diag. 30 komparante kun sinligo B1.

Kiam Blanko sinligas, ne multiĝas Blanka teritorio. Do oni nur devus pripensi pri Nigra teritorio. Alivorte la valoro de lim-aranĝo ĉi tie kalkuliĝas jene; kiam Nigro forkaptis kiel N1 en diagramo 29, kiom da poentoj Nigro gajnas?




Diag. 31 (Kiom da poentoj la Nigra teritorio kalkuliĝas?) Ĉi tiu estas diagramo post Nigra forkapto de tri ŝtonojn. Ĉi tiam Nigro jam gajnis 3 poentojn (de tri kaptitojn).

Problemo estas la supro. Kiom da poentoj Nigro havas ĉe la punktoj 'a'?
{paĝo 98 de la originalo}




Diag. 35 pri N1 kaj,...



Diag. 36 pri B1.

Kiel kutime prenas la mezon de la ambaŭa kazoj.



Diag. 37


Unue, kiam Nigro ŝtonmetas N1 en diagramo 35, fariĝas 1 poento ĉe 'a' kaj $1/3$ poento ĉe 'b'. Punkton 'b' oni kutime nomas 'duon poenta alterne-kapto', sed prave estas ke Nigro havas $1/3$ poento da rajto. Ĉar, Blanko povas fiksi ĉi tion per unu meto (sinligo B-b), sed Nigro bezonas du metojn, rekapti (N-b) kaj sinligi (N1 en diagramo 37). Sume por tri ŝtonmetoj de ambaŭaj flankoj, fariĝas unu poento da diferenco.

Nun Nigra teritorio en diagramo 35 kalkuliĝas je $1+1/3$ poentoj. Nigra teritorio en diagramo 36 estas sendube 0 poento. Do prenante la mezon, Nigra teritorio en diagramo 34 kalkuliĝas je $2/3$ poento.

Ĉi tiam ni neprene forgesu kaptiton ● en diagramo 33 forkaptita de Blanko. Oni devus kalkuli, ke en diagramo 34 Blanko anticipe havas 1 poenton.

Sumante la kalkulojn, en diagramo 34 Nigra teritorio nuntempe kalkuliĝas je $2/3$ poento, kaj Blanko anticipe havas 1 poenton. Do oni devus virtuale taksu Nigran teritorion en diagramo 34 je minus $1/3$ poento (, supozante ke Blanka teritorio: la kaptito ne ekzistas).
{paĝo 100 de la originalo}


Nun ni alproksimiĝas al la konkludo.




Diag. 38 Kiam Nigro sinligas per N-a, Nigra teritorio fariĝas je 2 poentoj. Kiam Blanko forkaptas per B-a, Nigra teritorio taksigas je minus 1/3 poento. Ĉi tiam prenante la mezon, la valoro A, priskribita ĉe diagramo 31 kalkuliĝas je '5/6' poento.

$$A = \{ 2 + (-1/3) \} / 2 = 5 / 6$$

Ni revenu al diagramo 29. Sumante la 3 poentoj da gajno per N1 (forkapti tri ŝtonojn) kaj la 5/6 poento {en diagramo 38}, la valoro de la lim-aranĝo kalkuliĝas je '3+5/6' poentoj. Tio estas 'iom malpli ol 4 poentoj'.




Diag. 39 Kompreneble en ĉi tiu formo, la forkaptanta ŝtonmeto N-a valoras 3+5/6 poentojn same kiel en diagramo 29. {Ankaŭ Blanka sinligo B-a.}




Diag. 40 (iom malpli ol 6 poentoj) Krome, en ĉi tia lim-aranĝo, la valoro multiĝas po ĉirkaŭ 2 poentoj por 1 ŝtono da multiĝo de minacataj ŝtonoj (⊙).

{paĝo 101 de la originalo}

En kazo de ĉi tiu diagramo, lim-aranĝo 'a' valoras iom malpli ol 6 poentojn.



Diag. 41 (Iom malpli ol 6 poentoj) Kiam la minacatoj plue multiĝas (▲), lim-aranĝo 'a' valoras iom malpli ol 8 poentojn.




Diag. 42 (Ĝusta kurso 1-15) Nun ni revenu al la ĝusta kurso. Post kiam Nigro metis N11 kaptanton, valoran je 5 poentoj, Blanko metas B12, sinligon valoran je iom malpli ol 4 poentoj, sekve Nigro devus meti N13 kaj N15, 'baton-kaj-sinligon'. Ĉi tio estas prava metodo.


Oni devas rimarki, ke 'bati-kaj-sinligi' kiel N13 kaj N15 ordinare valoras 2 poentojn, tamen en ĉi tiu kazo, rilate al Blanka devigita singardo, tio valoras 3 poentojn.

{paĝo 102 de la originalo}

Ni pruvu tion jene,...




Diag. 43 Kiam Blanko 'batas-kaj-sinligas' kiel N1 kaj N3,...




Diag. 43 Supozante posta interŝanĝo de B1 kaj N1, Blanka teritorio nombriĝas je 9 poentoj.


Aliflanke, post kiam Nigro 'batis-kaj-sinligis' kiel N13 kaj N15 en diagramo 42,...



Diag. 45 (Sensenca estas B1 {en japana regulo}) Se Blanko interŝanĝus ŝtonmetojn B1 kaj N1,...




Diag. 46 Ĉe la fino, kiam liberpunktoj  estas ŝtopitaj, Blanko devus singardi en sian teritorion. Se ne,...




Diag. 47 (Nigra rimedo) Nigro havus rimedon N1 kaj N3, por fari 'kunvivon'.

{paĝo 103 de la originalo}




Diag. 48 Kontraŭ B4, Nigro farus 'kunvivon' ĝis N5. Blanko ne povus kapti la Nigrajn 2 ŝtonojn ĉe angulo, kaj perdis la teritorion.



Diag. 49 Resume, en ĉi tiu formo, ĝuste kiam Nigro 'batis-kaj-sinligis' kiel N1 ka3, Blanko devos poste singardi per B-a, tial la Blanka teritorio fariĝas je 7 poentoj.

Komparu ĉi tiun diagramo kun diagramo 44. La gajno/malgajno kalkuliĝas jene; Nigro: 1 poento (ĉe 'b' en diagramo 49) kaj Blanko: 2 poentoj. Sume kalkuliĝas je '3 poentoj da diferenco'.



Diag. 50 (Ĝusta kurso 16-19, finiĝas.) Nun ni estas finanta la ludon.

{paĝo 104 de la originalo}

Post kiam Nigro metis 'baton-kaj-sinligon' valoran je 3 poentoj {en MalSupra Dekstra

